WIKIPEDIA

Kria lingvo

La **Kria** (krie: ᓀᐦᐃᔭᐤᐃᑲ *Nēhiyawēwin*, angle *Cree*, france *Cri*) estas la lingvo indiĝena la plej parolata en Kanado kun ĉirkaŭ 70 000 parolantoj.

Malgraŭ la ne tre grandnombra parolantaro la parolejo de la lingvo etendiĝas tra ĉ. 60 longitudaj gradoj. Do ne mirigas, ke evoluis multaj dialektoj. Fonetike eblas dividi ilin laŭ pluraj kriterioj, ekzemple:

- La longaj vokaloj **ê** kaj **î** parte estas apartaj fonemoj, parte kunfandiĝis.
- La orientaj dialektoj inter Labradoro kaj Ontario distingas inter **š** (ŝ) kaj **s**, la okcidentaj ne.
- La sono de retrofleksa "l", supozata en la pra-algonkina lingvo, disevoluis al diversaj sonoj en diversaj dialektoj.

Eblas klasi la dialektojn en naŭ grupojn, kiuj de okcidento al oriento estas:

- **Kria preria** (apartena al la ipsilona dialekto)
- **Kria arbara** (th-dialekto)
- **Kria marĉa** (n-dialekto), kies okcidenta varianto diferencas de la orienta per kunfandiĝo de **š** kaj **s**
- **Kria alka** (l-dialekto)
- **Jakoba-Golfa Kria** (ipsilona dialekto), kies norda varianto diferencas de la suda per la kunfandiĝo de **ê** kaj **î**, kiu tamen ne malhelpas interkomprenon
- **Atikamekŭ** (r-dialekto)
- **Okcidenta Montara** (l-dialekto)
- **Inu** (l-dialekto; foje nomata Orienta Montara)
- **Naskapi** (ipsilona dialekto)

Kria lingvo	
ᓀᐦᐃᔭᐤᐃᑲ *Nēhiyawēwin*	
Parolata en	Kanado
Parolantoj	10 875
Denaskaj parolantoj	117,400
Skribo	Latina alfabeto, Kanadaj Indiĝenaj Silaboj
Lingvistika klasifiko	
Algia	
Algonkena	
Centra algonkena	
Kria	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Nordokcidentaj Teritorioj
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	cr
ISO 639-3	cre
Glottolog	cree1271
Angla nomo	Cree
Franca nomo	cri
Vikipedio	

Enhavo

Vidu ankaŭ
Aliaj projektoj
Literatura
Foto

Vidu ankaŭ

- Krioj

Aliaj projektoj

Literatura

- The Cree syllabary at Omniglot (http://www.omniglot.com/writing/cree.htm)
- Cree at Languagegeek.com (http://www.languagegeek.com/algon/cree/nehiyawewin.html)
- Barber, F. Luis: *James Evans and the Cree Syllabic*. In: *Victoria Library Bulletin Toronto*. July 1940. vol. 2. No. 2. 16 p.
- Burwash, Nathaniel: *The Gift to a Nation of Written Language*. S.l., 1911. 21 p.
- Evans, James: *Cree Syllabic Hymn Book*. Norway House, 1841. In: *Bibliographical Society of Canada*; Facsim. Series 4. Toronto, 1954. 23 p.)
- Steller, Lea-Katharina (geb. Virághalmy): *Alkalmazkodni és újat adni – avagy „accomodatio“ a paleográfiában* (http://fullextra.com/modules.php?name=News&file=article&sid=786) In: *Paleográfiai kalandozások*. Szentendre, 1995. ISBN 963-450-922-3
- Ray, Margaret: *The James Evans Collection*. In: *Victoria Library Bulletin Toronto*. July 1940. vol. 2. No. 2. 16 p.

Foto

- Foto of Cree People in Canada (http://www.pbase.com/perrona/inuit__cree_rupert__river)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Kria_lingvo&oldid=6789155"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 15:20, 17 nov. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.